

# **Esperanto kiel kulturo de dauropov(ec)o**

## **(Pliay argumentoy por ekologia amendo de la UEA-statuto)**

Estas 2 majorioy en la mondo, se temas pri Esperanto: la unua tiu de la autoktonay esperantistoy en ilia diasporio, la alia tiu de la ceteray monday kuncivitanoy en iliy respektivay etnioy. & 1 simptomo estas komuna al ambau majorioy: Ili konsideras esperanton kiel internacian lingvon, pli detale: la unua kiel lingvan pacigilon-interkomprenijilon por savenda homaro, la dua simple kiel superfluazhon, char nebezonatan & nenaturan lingvon de eternay mondplibonig-emuloy. La problemo en ambau estas la fiksio de la mensostato ye chefe unudiscipline, t.e. nur lingve, orientitay & orientantay kriterioy

Novay epistemologiay & transdisciplinay alpashoy al futurinda perspektivo por la mondo prezentas la eblon de grandparte nelingva aliro al la memidenteco de neutrala internacia lingvo & esperantistay organizazhoy. Transdisciplineco integras sciencoyn, artoyn (intuicion), religioyn ktp. & la chiutagon por evoluigi raciayn paradigmoyn, kiuy (pli) adekvate respondas al la komplekseco de la Tero, ties geobiosfero & homrilatata mondo. Chefay kriterioy estas la nefiksio ye 1 tipo de logiko, la nepra preteco al dialogo & diskutado & la triptiko de rigoro (en argumentado), de malfermiteco (en la mensostato) & de toleremo (en la praktika kunvivado) (Vd. "Charto de Transdisciplineco", artikolo 14, <http://basarab.nicolescu.perso.sfr.fr/ciret/english/charten.htm>). Universitatnivele la "Akadmio de Natursciencoy Svisuyo" en la yaro 2006 formulis kiel 1 de siay celoy inter- & transdisciplinan esploron ([http://wapedia.mobil/eo/Akademio\\_de\\_natursciencoj\\_Svisujo](http://wapedia.mobil/eo/Akademio_de_natursciencoj_Svisujo)).

El chi nova malideologiisma fundamento evoluis en la lasta yardeko de la lukto pri medie, t.e. geobiosfere, & soci(al)e, t.e. intra- & inter-generacie, nedetruema & yusta futuro sur chi Planedo la t.n. "kulturoy de dauropoveco". La serchado pri chi kulturoy de dauropoveco nun forte survoyas, aparte en la landoy, kie la ekologiay konscio & konscienco estas altevoluatay.

Lau la universala naturo de la obyekto ankau la teoria & praktika agado koncerne neutrale internacian lingvon ne restas netushata de chi evoluo. La pure lingva-lingvistika aspekto ne plu sufichas. Ankau internacie enkondukenda neutrala lingvo devas submetiji al la postuloy de dauropoveco & idealkaze fariji parto de la kulturoy de dauropoveco.

Estas 2 chefay aspektoy chirilate:

1. Esperanto mem kiel lingvo prezentijas kiel imanente dauropova pro 2 evidentay kialoy:
  - 1.1 Pro la redukto de porsociay riskoy per "demokratia 2-lingveco".
  - 1.2 Pro la redukto de pormediay riskoy per "evitado de priresursa disipado & albiosfera toksado".

Se do neutrala internacia lingvo kiel Esperanto estas imanente dauropov-(ec)a komunikilo, ji lau sia trea naturo kompreneblas kiel la lingva parto de ekologia internacia komunikado.

2. La chefay Esperanto-organizazhoy jis nun ne eksplicite sin difinis lau la kriterioy de transdisciplineco (Vd.supre "Charto de Transdisciplineco") &/au de dauropoveco.

Chirilate lastatempe aperis ankau kelkay diversay publikazhoy koncerne kriterioyn pri la kulturoy de dauropoveco (ekz. <http://sachakagan.wordpress.com>). La chefay inter ili estas 1. resilienco, 2. la inter..., 3. sistempensado, 4. autoekopoiezio, 5. kunevoluoy, 6. malfermita etiko. Ne estu dubebbla, chu la elitoy de la Esperanto-Movado progresis en chi direkto. Grava punkto chikoncerne estas la postulo pri autoekopoiezio, lau kiu sistemoy konstruadas sin mem en stato de komunikado kun sia medio, ekz. en la kunevoluado de biodiverseco & kultura diverseco. Evi-

dentas en chi koncepto, ke estas socia, kultura & geobiosfera malavantaĵo kontrauefiki al la bio-stabiligay sistemoy de la geobiosfero per kultura agado. El tio klare montrijas, ke aplikado de Esperanto en la postondoy de ekologie detrua mondkoncepto ne povas esti bona solvo de la monda lingvoproblemo.

Evidentijas, ke ne nur la racio de la ordinara homo (& esperantoparolanto) en la strato, sed ankaŭ la transdisciplina diskurso pri daŭropoveco & ties kulturoy eldevigas ekologian amendon de la UEA-statuto, tiel, ke apud la paco & la Homay Raytoy la daŭropoveco fariĵu oficiala bazo de la UEA-laboro. Simila validas por aliaj organizazhoj de la oficiala esperantismo.

Chicele la "Asocio de Verduloj Esperantistay" (AVE) dum la UK en Montpeliero oficiale proponis yam 1998-09-06 chitipan amendon ([www.verduloj.org/34/Aveno\\_34.pdf](http://www.verduloj.org/34/Aveno_34.pdf)). Ji tekstas jene: "...amendi la UEA-statuton per kroma punkto A.3.d (rilato al la statuto de 1980): 'Eduki inter siaj membroy la konsciencon, ke iliaj agadoy devas akordi kun la Principo de Dauripova Evoluo sur nia Planedo'."

Certe oni hodiaŭ povus elekti alian frazon. Ankaŭ atentigo pri la imanente ekologia identeco de Esperanto eble taugus, ĉar el tia identeco ya kvazau automate sekvus la respektiva agado.

Chiukaze gravas & urjas, ke oni en la 2011-yara UK en Kopenhago pritraktu tion.

Wolfgang Guenther  
(UEA, SAT, AVE)

w.guenther.esperanto@web.de

2010-okt-27